

Numero: 315.
Aŭgusto: 2018.

26-a jarkolekto

VESPERTO

Literaturaj folioj



Redaktanto
Apáti Kovács Béla
Kaposvár, Béla király u. 44. HU-7400
Telefona: 06/20/497-03-64
Retadreso: apatikb111@gmail.com
Eldonanto: KAPOŠVARA ESPERANTO-CENTRO
Lingve kontrolis: Erzsébet Tuboly

Somerfino

Baldaŭe finiĝos la somero. Ankoraŭ kelke da semajnoj kaj alvenos aŭtuno.

La nuna somero estis tro varma, eĉ varmega. Pro tio oni suferis multe. Onidire tio ĉi estas pro la tuttera varmigo. La klimato ŝanĝigis. Eble ankaŭ Eŭropo fariĝos varmega kontinento en la sekvaj jardekoj kaj malaperos sezonoj. Dum la tuta jaro restos nur unu sezono la varmega somero.

Krome tio ĉi kaŭzos naturajn katastrofojn: inundojn, tempestojn, incendiojn pro la sekeco.

Jam ankaŭ en tiu ĉi jaro multloke ekbruliĝis arbaroj, kamparoj minacante loĝdomojn.

Ni homoj ne atendas pri nia medio. Ni malpurigas la aeron, teron kaj akvon. La marojn estas plenplenaj de diversaj plastoĵoj, kiuj kaŭzas gigantajn damaĝojn en la naturo.

Ni estas en la lasta sekundo por haltigi la teruran katastrofon, kiu pereigos nian planedon.

Ni defendu terglobon! Ni komencu novan pli homan vivon!

Ni ne malpurigu Teron. Ne estas solvo translokiĝi sur alian planedon.

Nia terpanjo pluras kaj vekrias: „Ne volu mian morton! Estu mia bona ido, homo!”

Se ni ne aŭdos ĉi vekiĝon, tiam la tagoj de la ĉi tiea vivo estas nombritaj.

Ankaŭ ni geesperantistoj povas fari multe, ke Tero restu ankaŭ por la estonto.

Certe ankaŭ vi ŝatus, se nia loĝloko estu pura kaj ĉi tie la vivo estu bona kaj paca.

Estu la celo de ĉiuj geesperantistoj konservi la terglobon, por ke cent aŭ ducent jaroj geesperantistoj povu kongresumi en iu belega urbo de Tero.

— Redaktanto —



Du babilantaj katoj

Du katoj sidis vespere sur la tegmento de la domo kaj ili babiladis.

— Ni katoj estas pli saĝaj kaj pli inteligentaj ol la homo – diris la nigra kato al sia amiko.

— El kio vi pensas, amiko? – demandis la blanka kato

— Aŭskultu min! Mi komprenas la lingvon de mia dommastro, sed li ne komprenas la mian. La homoj ne parolas la katolingvon. Kvankam ili havas ankaŭ plurajn, kiuj kaŭzas al ili grandan lingvoĥaoson. Ni katoj ne havas tian problemon. Ni povas komprenigi nin ankaŭ eksterlande. Ĉu ne? Se mi estas bone informita vi vivis longtempe en Germanio.

— Jes. Mia iama dommastro vivis en Hamburgo. Ho, kiom belega urbo ĝi estas! Ofte mi promenadis en la proksima ŝiphaveno kaj tie estis fiŝistoj. Ili donacadis al ni fiŝojn, veran maran fiŝon.

— Mi memoras, kiam vi alvenis ĉi tien, ni tuj povis babiladi. Ni ne bezonis interpretiston. Ankaŭ la germanaj katoj parolas la similan katolingvon, kiel la hungaraj. Sed la homo devas lerni lingvojn, se ili volas komuniki kun eksterlandanoj. Ridinde. Ĉu ne?

— Amiko, vi tute pravas. Ni katoj ne havas lingvajn malfacilaĵojn, ni komprenas unu la alian. Krome ni komprenas ankaŭ la parolon de la dommastro.

— Sed li ne komprenas nin. Mi proponas, la homo lernu ankaŭ katolingvon por ke ni ne devu petegi, se ni deziras freŝan lakton.

— Kiel instrui al homo la katolingvon? Ĉu vi havas ideon?

— Laŭ mi oni devus devigi la instruadon de la katolingvo en la bazlernejo. Ĝi estus pli utila, ol alia mondlingvo.

— Prave, prave, amiko. Oni instru la katolingvon jam en la bazlernejo!

— Espereble post kelkaj jaroj ĉiuj homoj parolos la nian kaj ĝi fariĝos mondlingvo.

— Ŝaŝa —



Glacioskulptisto

Li revadis pri belegaj glacioskulptaĵo. Nokte sonĝante li vidis admirindan virinon. Li planis eternigi sian sonĝobildon.

Li staris antaŭ la malfermita fridujo kun tremanta koro. Liaj okuloj estis fermitaj kaj pensis pri frosta vintro.

En la julia arda sunbrilo li revadis pri glaciamaso en kiu tie kaŝiĝas la virino de lia sonĝobildo.



Ĉevalisto

Sur verdaj kampoj cent ĉevaloj galopis, kiel ĉielaj birdoj sur la firmamento.

Li staris kaj rigardis la ĉevalojn.

Ho, se ankaŭ li estus inter ili!

La beleco de la ĉevaloj kaptis lin kaj li ne povis liberiĝi de tiu ĉi fantasta bildo.

La ĉevalaro kuris kaj kuris. Li nur rigardis la bestojn revante ĝis la belega bildo forvaporigis.



Lokomotivestro

Li jam deziris fariĝi lokomotivestro infanaĝe. Dum la tuta tago li rigardis la vagonarojn feriante ĉe avino.

La maljunulino loĝis proksime de la stacidomo. Ĉe la ĝardena barilo estis reloj, kie kuregis la vagonaroj de mateno ĝis malfrua vespero, eĉ ofte ankaŭ nokte.

Kaj nun li stiras la gigantan maŝinon ĉe la barilo de avino, kiu jam delonge mortis.



Fiŝkaptisto

Antaŭ li estis la rivero kaj li sidis sur la riverbordo. Suno jam pretiĝis malleviĝi por ke ĝi transdonu la postenon al Luno.

Muta silento. Jam ankaŭ la birdoj silentiĝis serĉante tranoktejon sur la branĉoj de la arboj.

Li nur sidis silente kaj rigardaĉis la grizan preskaŭ senmovan akvon. En lia mano estis fiŝvergo.

Hodiaŭ li kaptis ankoraŭ nenion. La fiŝoj priridis lin. Ilia ridaĉo aŭdiĝis el sub la akvo.



Policisto

La homoj primokis lin. Se li ekaperis ie la homoj silentiĝis. Neniu volis paroli. Vane li instigis ilin, ke ili babildu trankvile, antaŭ ol li alvenis.

La homoj mute rigardis antaŭ sin.

Ja, policisto estas en la drinkejo.

La silento estis doloriga. Kiam li foriris, en la ejo denove laŭta rido estis aŭdebla.



Dio


Dio ĉirkaŭrigardis sur la terglobo kaj li ege malĝojiĝis.

La homoj estis tre malbonaj. Ili ne sekvis liajn instruojn, kvankam lia filo Jesuo Kristo mortis por ili.

La homoj neniam lernas – konstatis Dio. – Mi denove devas puni ilin. Ili ne meritigas la dian helpon. La homoj militas, murdas unu la alian kaj neniu estimas la alian.

— Morgaŭ mi punos ilin – diris Dio kaj enlitiĝis.

— Verkis: Apáti Kovács Béla —



Poezio

Mi malfermas poemlibron. Singardeme mi prenas ĝian kovrilon. La libro ekmuzikas. Mi timeme reprenas mian manon kaj mi atendas.

Ĉu malfermi aŭ ne? Kia surprizo estas inter la folioj.

Mi estas tre scivolema, malgraŭ tio mi timas malfermi la poemlibron.

Mi scias, se tute mi malfermos ĝin mi iros al la ĝardeno de feinoj kaj eble por ĉiam mi restos tie.

Kion vi farus, se tiu ĉi poemlibro estus en via mano?

Mikaelo Bronŝtejn

Jam kiam...

Jam, kiam mi estiĝos
Tute laca, tre kaduka, –
Tiam iam okupiĝos
Nure pri labor' traduka.

Kiam haroj perdos denson,
Montros grizon surtempian,
Tiam ĉiun fremdan penson
Mi tradukos, kvazaŭ mian.

La propra opinio
Estingiĝos sinofere,
Kaj degelos mia mi
Eĉ surpapere.

Jam, kiam mi kutimos
En la plato serĉi fundon,
Volnevole ekestimos
Ŝtelon, flaton, monabundon,

Kiam nur iama gloro
Inercie antaŭkuros,
Mi en iu trista horo
Mian gorĝon, certe, ŝnuros.

Se donus tian sorton
Mia sorta vivovojo, –
Mi preferas ĝojan morton
Al la morta ĝojo.

Jam, kiam dum izolo
Mornaj pensoj min sieĝos,
Tiam iam mi en folo
La amikojn forajn preĝos.

Ja hela rememoro
Tiam tuŝos min ekstaze –
Doloreto, ne doloro,
Kvazaŭ vangon vundis raze.

Se la esto jam ne festo,
Nur la griza emocio, –
Mia fora ul' favora
Savu min de tio.



L. L. Zamenhof

Al la "Esperantisto"

En bona hor'! Ni aŭdis la signalon
kaj bataleme saltas nia koro.
Konduku nin, komencu la batalon
sub bona stelo, en feliĉa horo!

Amikoj de proksime, malproksime,
salutas vin, ho nia luma stelo!
Konduku nin, senhalte kaj sentime,
al nia granda, sankta, glora celo!

Ne tre facila estas nia vojo
kaj ne malmulte ankaŭ ni suferos;
sed batalante, kun plej granda ĝojo
senhalte ni laboros kaj esperos.

For estas jam la baroj de l' komenco,
l' unua muro estas trarompita,
kaj dolĉa estos nia rekompenco,
kiam la celo estos alvenita.



Por infanoj



FABELO 1 /en daurigoj entute 4 partoj-
apartaj rakontoj/

Mira Renkonto

Iun belan tagon ekiris
arbaren malgranda familio. Inter patro kaj patrino
fiere paŝadis knabeton. La knabeto nomiĝas Petro
.Li estis kvarjaraĝa knabo..

La tutan matenon ili piknikis en
arbaro troviĝanta proksime de la familiodomo.

Petro gaje saltetis kaj ĵetis la pilkon
poste kuris tra verda herbejo por kapti ĉu pilkon
ĉu papiliojn .

Iun momenton li ekvidis duone blankmakulitan
katon. Kia bela kato –
ekpensis li samtempe alproksimiĝante al la kato. La
blankmakulita kato sidis ne moviĝanta atendanta
lian reagon.

– Kiu vi estas - demandis la kato miaŭe la
knabeton.

– Mi estas Petro – respondis
la knabo iom surprizanta ĉar li kapablas kompreni
la bestan parolon..Tuj li estis preta ion diri kiam
li ekvidis hundon staranta apude

– Mi tre amas vin – diris Petro montrante fingre
unue , al la kato kaj al la hundo .

– Mi vin ambaŭ amas –dolĉe Petro ripetis siajn
vortojn.

Tiam la hundo ekbojis – Av av...mi tre amas vin
.Belaj vortoj ..ĉu ... sinceraj .?

Petro respondis gaje – Jes sinceraj .Vere plaĉas
al mi via amikeco.Ŝajnas al mi ke ni konas unu la
alian jam longe .

– Jes ,-respondis la bestoj unuvoĉe. – Ja, mi
petas vin, ĉu vi akceptu min en via gaja amika
rondo.-Petro petis ilin aldonante – Ni ludos
kune ĉi –tie. Mi ne estu plu sola.

– Kompreneble ni volonte akceptas vin .-
respondis la hundo gaje svingante per vosto al
li dum la blankmakulita Kato tenere karesis liajn
manojn.

Dume la gepatroj de Petro decidis reveni
hejmen.La patrino kolektigis la varojn metante ĉion
en la dorsosakon.

– Mi ne vidas Petron – diris ŝi iomete zorgeme
. La edzo tuj respondis formetante la gazeton – Mi

vidis lin tie ,vidalvide nin .Ja vere mi perdis lin je
mia okulrigardo. Kie li malaperis ?

Ili ekis alvoki lin – Petro ...Petroooo eĥas tra
arbaro.

Dume Petro kaj la amikoj estis brue ludantaj
kiam hundo diris.

– Petro ,vidu, tiun birdeton super niaj kapoj .Ĝi
estas ne nur nia kantistino sed ankaŭ nia gardistino
Nome, ĝi flugas alten kaj ĉion vidas .

– Jes,vi pravas .Mi proponas ankaŭ akcepti
ĉi tiujn papiliojn. por amikadi. – Jes ,jes!- ĉiuj
kapjesis gaje.

Subite la birdeto flugile montris ke io okazas.

-Silenton,Silenton amikoj .. aŭdiĝas ia
maltrankvila voĉo vokanta PETRO ,PETRO..

– Ja ,vere , oni alvokas mian
nomon Tiuj voĉoj estas de miaj gepatroj – diris
Petro Verŝajne ili estas maltrankvilaj ĉar ili ne
vidis min. – Petro respondis .Mi devas forlasi vin
,karaj amikoj, sed mi promesas ke
ni denove renkontiĝu tie.

Lia voĉo ŝanĝis Nun ĝi sonas malgaje.

– Gxis nova renkonto – respondis unuvoĉe la
amikaro.

– Kial vi kasxis sin sub tiu benko ? Petro,
mi demandas vin ..respondu –Ĉu vi estis laca
kaj ekdormis tie. – demandis lin la
patro zorgemvoĉe.

– Kara Petro ,kie vi malaperis –demandis la
patrino kliniĝanta al lia kapo .

– Ho ,vere Mi ne scias. Akcentis la Petro`` mi ``
iomete embarase.

Li turnis sin ĉirkaŭe por vidi siajn amikojn. –Kie
ili malaperis – flustris li en sia mentono .

La patro prenis lian dekstran manon kaj patrino la
maldekstran .Tiele ili tiradis lin inter si forte tenante
liajn manojn.

Baldaŭ ili malsupreniris la enirejon de la Verda
arbaro.Tie troviĝas vico da benkoj. Apud la lasta
benko videblas hundeto kaj blankmakulita kato
.Ĉirkaŭ ili flugis papilioj.Subite aŭdiĝis birda
pepado `` Ĝis nova renkonto``Petro turnis lian
kapon kapjesante al ili

– Jes miaj amikoj, ni renkontiĝos baldaŭ ! – diris
Petro okulsigne kaj svingante la manon al la
direkto de amikaro.

-Ĝis nova renkonto- ripetigis la birda pepado.

FINO de la unua parto

verkis Miricx Jadranka –Zajecar-Serbio Julio 2018



Konstruaĵoj

Konstruaĵoj

